


ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2002/1

printempo / somero 2002

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*



LUMO

Lumon eldonas dufoje jare KEA, P.O. Box 2159, Sidney, BC, Kanado V8L 3S6
Lumo ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association
Lumo ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

Retadreso: <www.esperanto.ca/kea/>

ENHAVO DE LA NUMERO

Novaĵoj de KEA	3
Honorigo de Steĉjo Norvell	3
Nekrologo de Dorothy Hawley	3
Mesaĝo de la prezidanto	4
Por pli vasta komunumo (UEA informfolio)	5
Artikoloj	6
Recenzo de <i>Fundamenta Krestomatio</i> (B. Arthur)	6
Informi la neesperantistan gazetaron... (R. Corsetti)	8
La Ret-listo "Rebato" (R. Corsetti)	8
Lingvaj Homaj Rajtoj (R. Corsetti)	9
Desegnaĵoj de Bruce Arthur	12
Internaciaj novaĵoj	13
Aŭtomata tradukado al Esperanto	13
Esperanta Televido	14
Esperanta Ĉokolado	14
Subvencioj por lingvistoj	15
Lanĉo de Edukado-Net	15
Venontaj UK-oj	16
Komunikada Centro en Bruselo	16
La unua Esperanto-sinfonio nun haveble kompaktdiske	16
La nova PIV de Esperanto havebla	17
Krucvortenigmo (D. Reble)	18
Solvo de la lasta krucvortenigmo (D. Reble)	19
Superzam	20

Kolumno de la redaktoro

Unue, mi gratulu al Bill Harmon el Usono, kiu gajnis la \$20 pro sia tutkorekta solvo de la krucvortenigmo en la lasta numero. Konsolan premion de \$10 oni sendis al du halifaksanoj, kiu pli frue kaj preskaŭ senerare solvis ĝin, Gene Keyes kaj Maria José Faria Graça. Denove ni proponas enigmon al vi, kaj denove ni proponas samgrandan premion al la sendonto de la unua tutkorekta solvo.

Due, se vi atente tralegas la numeron, vi rimarkos ke iom pli malabundas kanada enhavo ĉi-foje; iuj eble eĉ kredus ke la prezidanto de UEA, Renato Corsetti, fariĝis ia kunlaboranto de la revuo. Mi ne pardonpetas pro la enmeto de pluraj artikoloj de D-ro Corsetti, tamen, ĉar ili ĉiuj ŝajnas al mi interesaj kaj taŭgaj. Sed mi ja bedaŭras la mankon de artikoloj verkitaj de vi, la legantaro, kaj mi aparte dankas al Bruce Arthur kaj Don Reble, kiuj fariĝas iel regulaj kunlaborantoj. Finfine, mi agnosku denove la grandan helpon de Steĉjo Norvell en la preparo de ĉi tiu numero.

Geoffrey Greatrex
602-125 Somerset St. West
Ottawa, Ontario, KANADO K2P 0H7
<greatrex@uottawa.ca>

Limdato por la venonta numero: 20a de decembro 2002.

Novaĵoj de KEA

HONORIGO DE STEĈJO NORVELL: FESTPAROLO DE LA PREZIDANTO

Karaj Novskotianoj, gastoj

Kvankam nia Kanada Esperanto-Asocio ne estas (ankoraŭ!) tre multnombra Asocio, mi kiel prezidanto tamen konstatis, ke en preskaŭ ĉiu loka grupo troviĝas kelkaj veraj juveloj dise tra la lando - t.e. tiuj laboremaj kajkonvinkitaj personoj, kiuj per sia sindonemo (ĉu kiel funkciuloj de loka grupo, ĉu kiel instruantoj de la lingvo, ĉu kiel mecenatoj ktp.) helpas ne nur vivteni la Asocion, sed kelkfoje eĉ progresigi ĝin malgraŭ la multaj obstakloj, kiuj alfrontas nin en Kanado. Kaj certe inter tiuj personoj ni povas kalkuli Steĉon Norvell, kiu dum multaj jaroj fidele kaj multflanke servis kaj nian Asocion kaj nian lingvon. Nome de la Asocio mi do volas elkore danki al Steĉjo pro lia granda sindediĉo kaj oferemo al nia Afero, kaj havas hodiaŭ apartan honoron nun publike anonci, ke la Estraro de Kanada Esperanto-Asocio ĵus voĉdonis por elekti Steĉjon Norvell sian Honoran Membron por la jaro 2002.

Mi do invitas vin ĉiujn nun levi vian vinglaseton/tetason/kaftason por tosti al nia nova Honora Membro: "multajn jarojn al li! Kaj vivu Esperanto!"

Brian D. Kanceen

NEKROLOGO – DOROTHY HAWLEY

La ĉefa motoro de la esperanto-movado en Calgary forpasis la 15-an de decembro 2001. F-ino Hawley naskiĝis en 1908 en Winnipeg. Ŝi estis mezlerneja instruistino pri la franca ĝis sia emeritiĝo en la jaro 1970.

Dorothy esperantistiĝis en 1961. En 1965 ŝi vojaĝis al Eŭropo por eksperti ĉu la lingvo vere taŭgas kiel internacia komunikilo. Ŝi revenis entuziasmoplene kaj starigis lokan klubon. Dum multaj jaroj ŝi intruis E-on vespere al plenkreskuloj kaj tiamaniere la klubo konstante kreskis. En 1975 ŝi estris la ege sukcesan tutkanadan kongreson en Calgary. En la sama jaro helpe de ŝia aŭtomobilo ŝi konstruigis taŭge ornamitan ĉaron kaj enirigis ĝin en la parado okaze de la "Kalgaria Stampedo".

En 1988 Dorothy preparis kaj eldonis je siaj propraj rimedoj 6000 ekzemplerojn de la libreto "Saluton amiko" okaze de la vintraj olimpikaj ludoj. Ĉiu partoprenanto ricevis sian propran ekzempleron. Tio helpis la komunikadon inter tutmondaj atletoj.

Ege talenta verkistino kaj muzikistino, ŝi verkis kaj la vortojn kaj la muzikon por la konata kanto "Nia cel". Ŝi ankaŭ verkis belegajn esperantajn vortojn por "Odo al Ĝojo".

Dorothy restis vigla (krom iom misfunkcianta aŭdkapablo) kaj aktiva ĝis kelkaj tagoj antaŭ ŝia morto.

Malgraŭ ŝiaj nombrelaj kontribuoj al la movado la lokaj klubanoj ĉiam memoros ŝin unuavice kiel dolĉa, donacema, entuziasma kaj bonkorega amikino.

Allan Simon

MESAĜO DE LA PREZIDANTO

Karaj KEA-anoj,

Mi esperas, ke ĉiu membro jam meze de junio bonorde ricevis la ĉi-jaran Membroliston de nia Asocio - kaj se ne, nepre informu nin! Mi volus ĉi tie danki al ĉiuj ĝustatempaj kotizintoj, kaj refoje al ĉiuj niaj fidelaj DM [dumvivaj membroj], kies nomoj nun plenigas preskaŭ tutan paĝon de la matrikulo. Dankon ankaŭ al niaj kasisto kaj sekretario, kiuj zorgis, ke tiu listo estu laŭeble ĝisdata kaj korekta - se tamen malgraŭ ĉio enŝteliĝis eraro, ankaŭ tion ne hezitu komuniki al mi.

Se mi bone kalkulis, ni estas nun ĉ. 171 kotizintaj asocioj en Kanado. Kun ioma miro mi konstatas, ke laŭprovinco BK estas en la unua loko, ON en la dua, kaj QC en la tria [statistikon pri ESK mi bedaŭrinde ne havas]. Meze de nia vasta lando kaj ĉe-atlantike niaj nombroj estas iomete pli magraj. Por juĝi laŭ niaj vankuveraj cirkonstancoj kaj pro propraj interretaj spertoj mi suspektas, ke ni estas tamen pluroble 171 en Kanado. (Ĉi-rilate lokaj grupoj ne subtaksu la informan valoron de propra retejo en la loka lingvo - ĉar tio ŝajnas esti la fonto de pluraj niaj lastatempaj membroj). Certe vi spertis, kiel mi, dum via informada laboro por nia lingvo, ke la unua demando kutime estas "Kiom da Esperantistoj vi estas?", aŭ "Kiom da personoj parolas Esperanton?" Nu, tiu menciita cifero ne estas aparte prifanfaroninda, sed mi certas, ke ni povus sen tro granda peno kreskigi ĝin, se ni nur povus membrigi ĉiujn "kaŝ-Esperantistojn" en la lando - t.e. personojn, kiuj uzas nian lingvon, sed ial ne (aŭ ne plu) havas kontakton kun ni, nek pretas oficiale ligi sin (aŭ kotizi?!) al nia Asocio nek al la movado. La problemo estas, kiel kontakti ilin. Via tasko? Provu en via regiono elfosi ilin (tamen nur la ankoraŭ vivantaj!), kaj per miela lango provi persvadi ilin aniĝi (kaj kontribui!) al KEA, ĉar kiel vi sendube konscias, la ĉefaj fontoj de niaj enspezoj estas viaj membrototizoj kaj viaj malavaraj donacoj; kaj aliflanke niaj ĉefaj elspezoj estas por nia revuo LUMO kaj pro la daŭre kreskantaj poŝtokostoj.

Trovi permanentan tenejon por nia restanta KEA-arkivo estas problemo, por kiu via estraro ankoraŭ ne trovis kontentigan solvon. [Temas ĉefe pri E-revuoj kaj gazetoj - kaj jarkolektoj kaj opaj numeroj - nun flaviĝantaj en kartonaj skatoloj en kelo sur la Vankuvera Insulo; kelkaj datiĝas eĉ de antaŭ 1900 kaj povus havi gravan historian valoron, sed neniu el ni sufiĉe kompetentas por juĝi tion. Urbaj kaj universitataj bibliotekoj interesiĝas nur se la aferoj cirkulus, kaj pretekstas spacomankon]. Lige kun tio ni devus baldaŭ trovi inter nia membraro kompetentan historiografon, kiu okupiĝus pri la historio de Esperanto en Kanado jam antaŭ la forpaso de niaj nunaj pli aĝaj membroj. Se vi konas bonan kandidaton por tiu laboro, bonvole sciigu nin!

Se vi havas retaliron, nepre vizitu foje la retejojn de niaj kanadaj regionaj grupoj - vi trovos liston da ili vizitante unue nian KEA-retejon ĉe <http://esperanto.ca/kea/>. Tiujn restantojn en la mallumo (ankoraŭ sen retaliro) mi povas nur kompati, ĉar estas nun tiom da interesaj Esperantaj retejoj, ke oni povas ĉiutage malkovri ion novan.

Dezirante al ĉiuj agrablan someron, amike salutas via

Brian D. Kaneen (prezidanto de KEA)
bodokan@telus.net

[Ndlr. vidu aliflanke folion preparitan de la CO de UEA, kiu ĝuste instigas al legantoj aliĝi al landa asocio]

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando;
tel. +31 10 436 1044; fakso +31 10 436 1751; retpoŝto <uea@inter.nl.net>; TTT <http://uea.org>

Por pli vasta komunumo

Kial finfine mi devus aliĝi al:

- ★ la loka Esperanto-klubo
- ★ la nacia landa asocio
- ★ la asocio de mia fako aŭ hobio
- ★ Universala Esperanto-Asocio

Ekzistas almenaŭ du bonaj kialoj:

★ La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio, unuvorte ilí laboras por "lingva demokratio". Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al la nacia, faka aŭ monda asocioj (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estas parto de tiu tutmonda Esperanto-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj de ĉiuj niveloj, kaj povas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

★ Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj kaj koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastiganta de lokaj esperantistoj. Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj faras tute nature, ĉar ilí estas daŭre informataj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝ-eblecoj.



RECENZO DE LA *FUNDAMENTA KRESTOMATIO*

La *Fundamenta Krestomatio* de la lingvo Esperanto estas grava libro en la historio de Esperanto. Mi trovis ke ĝi ankaŭ estas libro kun interesa enhavo.

La unua eldono de la *Fundamenta Krestomatio* aperis en 1903. Sed la ekzemplero kiun mi ricevis de la libroservo de KEA estas de la 15a eldono. Tamen eĉ ĉi tio estas malnova - ĝi presiĝis en 1936.

La *Fundamenta Krestomatio* estas kolekto de diversaj rakontoj, artikoloj kaj poemoj. D-ro L.L. Zamenhof verkis aŭ tradukis iujn partojn de la libro, kaj li korektis ĉiujn aliajn partojn. Laŭ lia antaŭparolo, multaj esperantistoj petis ĉi tian krestomation. Per ĉi tiu libro, Zamenhof celis disponigi modelon de esperanta stilo. Li rekomendis ke atente legu ĝin "ĉiu, kiu volas skribi aŭ parole uzi la lingvon Esperanto." Farinte tion, lernanto povos legi aliajn verkojn, lernante tieajn riĉigaĵojn kaj perfektigaĵojn sen alproprigo senintence de stilo erara.

En 1907 Zamenhof verkis duan antaŭparolon, kiu aperis en plipostaj eldonoj de la verko. Ĉi tie li asertas ke li korektis preterparojn, sed ŝanĝis nenion alian. Li diris ke li trovis esprimojn, kiujn li volonte ŝanĝus. Tamen li decidis ke konsekveneco estas pli grava ol perfekteco. Zamenhof ankaŭ rimarkis ke en la Krestomatio troviĝas kelkaj vortoj aŭ esprimoj, kiuj ne samas ĉie. Ekzemple, la nomo de nia lando estas "Kanado" en unu loko en la libro, sed troviĝas "Kanado" aliloke. Pri tio li diris ke "ne venis ankoraŭ la tempo por diri la lastan vorton pri tiuj dubaj formoj".

Sekcio de la Krestomatio enhavas fabelojn kaj legendojn. Iuj estas de Eŭropo, inkluzive du fabelojn de Hans Christian Andersen. Ankaŭ estas hindaj legendoj kaj araba legendo. Mi trovis ilin interesaj, kvankam ili estas strangaj. La sekvan sekcion konsistigas anekdotoj; oni tie trovas ŝercojn kaj similajn rakontetojn. Poste, estas sekcio de rakontoj. Estas ok rakontoj pri diversaj temoj, kiel, ekzemple, aventuro, krimo, amo, eĉ alkoholismo. Laŭ mi, ili estas interesaj. La sekva sekcio titoliĝas "El la vivo kaj sciencoj". Ĉi tie troviĝas diversaj artikoloj, ekzemple pri transoceana poŝto, vegetarismo, termitoj en Afriko, arbegoj en Kalifornio. Zamenhof, okula kuracisto, tradukis artikolon pri okula malsano, "katara konjunktivito". Ĉi-lasto artikolo enhavis multajn fakvortojn, sed bedaŭrinde ĝi ne donas difinojn nek klarigas, kiel Zamenhof elpensis ĉi tiujn vortojn. Ankaŭ estas artikolo kiu matematike klarigis kiel funkcias iu sunhorloĝo. Ĉi tiu artikolo estis super mia kompren-kapablo. Sed ĝenerale la artikoloj de ĉi tiu sekcio estas facile kompreneblaj kaj en interesa stilo. Mi interesiĝis legi pri tiaj modernaj aferoj kaj novaj malkovroj - de antaŭ cent jaroj!

Poste troviĝas sekcio pri Esperanto, kiu ankaŭ multe interesis min. Represitaj de la Unua Libro de Esperanto estas la antaŭparolo kaj la plena gramatiko (tio estas, la 16 reguloj). La Krestomatio ankaŭ havas ekzercaron de Zamenhof, kvankam ĝi aperas en aparta sekcio de la libro. En la sekcio pri Esperanto ankaŭ estas du aliaj artikoloj de aliaj verkistoj.

La fina sekcio de la Krestomatiokonsistiĝas el poemoj. Mi trovis ke la plimulto el ili estis malfacile komprenebla. Inter ili, la plej interesa al mi estis "Nova Kanto", kiu facile kompreneblis kaj ankaŭ havas klaran rimon kaj ritmon. La sekcio finiĝas per traduko de parto de *Hamleto* kaj la *Iliado*.

Kiam mi legis la Krestomation, mi trovis ke la lingvouzo tre similis al nuntempa uzado. Mi opinias ke tio estas bona. Estas kelkaj ekzemploj de ŝanĝoj, sed en tiuj kazoj estas bonaj kialoj. Ekzemple, oni plurfoje uzas la vorton "elrigardi" kie ni hodiaŭ uzas la vorton "aspekti". La Krestomatio ankaŭ uzas la vorton "lasi" kun la signifo de "igi". Mi ankaŭ trovis ke oni prefere diris "ne devas fari" kiam la signifo efektive estas "devas ne fari". Tiuj estas ekzemploj de konfuzaj, nelogikaj uzoj, kiun malrekomendas la *Plena Vortaro* kaj aliaj pli novaj libroj. Zamenhof mem skribis en la antaŭparolo ke li ŝanĝus iujn esprimojn. Estus interese scii ĉu li pensis pri tiuj ekzemploj aŭ pri aliaj.

Fine, kiam mi legis la Krestomation, mi atente notis kiel Zamenhof uzis majuskulajn literojn. Estas malnova disputo pri majuskloj en Esperanto. Iuj diras ke kiam oni kreas vorton de radiko kun majuskla litero, ankaŭ la kreita vorto devas havi majusklan literon - ekzemple, Kanado, Kanadano. Sed aliaj asertas la malon - ekzemple, Kanado, kanadano. Plejmultaj revuoj uzas la duan stilon. Tamen mi sciis ke kiam Zamenhof tradukis la Malnovan Testamenton, li uzis la unuan stilon. Do mi volis vidi kiun sistemon uzas la *Fundamenta Krestomatio*. Nu, la Krestomatio kelkfoje uzas la unuan stilon, kaj kelkfoje la duan! Sed la nomoj de popoloj aŭ nacioj estas preskaŭ ĉiam sen majuskloj (male ol en la traduko de la Biblio).

Konklude, la *Fundamenta Krestomatio* enhavas diversajn interesajn rakontojn kaj artikolojn, kaj mi opinias ke ĝi estas leginda simple pro tio. Sed la celo de la libro estas iĝi modelo de ĝusta lingvo-uzo. Mi opinias ke estas aliaj libroj kaj egale revuoj, kiuj egale bone servus tiel. Tamen, se oni volas studi la lingvo-uzon de Zamenhof, ĉi tiu Krestomatio estas certe studinda.

Bruce D. Arthur

INFORMI LA NEESPERANTISTAN GAZETARON KAJ NEESPERANTISTOJN ĜENERALE

“Mi ne estas informisto, estas mi esperantisto”. Tiel proksimume diras multaj esperantistoj. Aliflanke, kiel ni scias, la muroj de miljaroj falos kaj la neŭtrala lingva fundamento ekestos nur per laboro de la esperantoj.

Tion per pli modernaj vortoj diras ankaŭ la nun valida labor-plano de UEA, kiu aparte emfazas informadon.

Mi volas per ĉi tiu mallonga teksto prezenti al vi sperton, kiu povus esti ĝeneraligata.

En Italujo ekzistas eksterdordina esperantisto, Ĝorĝo Bronceti (Giorgio Bronzetti), kiu opinias, ke malmultaj lernas Esperanton simple ĉar neniu parolas al ili pri ĝi. Ĉefe la ĵurnaloj daŭre parolas nur pri la angla kaj la neceso lerni la anglan. Nu - Ĝorĝo diris iun tagon - kial ni ne starigas sistemon por disdoni informojn al la gazetaro en la nacia lingvo pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto?

Ĉar li apartenas al tiu speco de esperantistoj, kiuj ne atendas, ke aliaj faru, sed faras mem, li komencis puŝi siajn geamikojn starigi la sistemon, kaj nun la sistemo en Italujo funkcias. Ĝia nomo estas “disvastigo” (ĝuste tiel en Esperanto), kaj ĝi ne nur donas informojn al la gazetoj, sed ankaŭ al la parlamentanoj. Ĝi kunlaboras kun la Komunikad-Centro en Bruselo, kaj tiel multe pli. Ĝorĝo evidente ĉerpas siajn informojn el pluraj fontoj kaj el pluraj listoj, interalie el <e-inf@yahoogroups.com>, kiu liveras tiajn tradukeblajn informojn al ĉiuj esperantistoj.

Mi scias ke kelkaj landoj havas propran sistemon similan, sed estus bele, se multaj landoj celus starigi similan sistemon. Ĝorĝo pravas pri tio, ke neniu lernos Esperanton, se neniu parolos al la publiko pri lingvaj problemoj kaj Esperanto. Ĉar neniu potenca grupo volas fari tion, eble ni mem faru kiel Ĝorĝo.

Renato Corsetti

<renato.corsetti@esperanto.org>

LA RET-LISTO “REBATO”: BELA EKZEMPLO PRI TIO, KION ONI POVAS FARI

Don Harlow estas usona esperantisto kun multaj ideoj kaj, ĉefe, kun la energio por realigi ilin. Antaŭ kelkaj monatoj li (re-)starigis la ret-liston <rebato@yahoogroups.com>, kiu komencis funkcii kiel disvastiganto de artikoloj pri (ĝenerale ‘kontraŭ’) Esperanto, por ke esperantistoj tra la mondo reagu al ili prefere en la lingvo de la ĵurnalo, foje en aliaj lingvoj, foje en Esperanto kun traduko al nacia lingvo.

En ĉi tiuj monatoj UEA atente sekvis la evoluon de tiu listo, ĉar ĝi perfekte kongruas kun la labor-plana linio: “Informado”. Okazis, ke ĝi akiris 102 listanojn, kaj ke ĝi kaŭzis plurajn centojn da reagoj, el kiuj almenaŭ pluraj dekoj aperis en tre gravaj gazetoj tra la mondo.

Oni ne povas citi nomojn por eviti ofendi la necititajn, sed la elito de la esperantistaro, se mi rajtas tion diri, estas inter la reagantoj, kaj ili faras unuarangan laboron.

Jen tri finaj konsideroj:

☆ ofte la listo sukcesas okupiĝi nur pri artikoloj en grandaj lingvoj (angla, franca, hispana, portugala, foje germana). Estus la kazo aliĝi al ĝi por informi ankaŭ pri artikoloj en aliaj lingvoj.

☆ se vi havas iom da libera tempo, kaj se vi kapablas informi pri Esperanto, aliĝu al tiu listo per malplena mesaĝo al <rebato-subscribe@yahoogroups.com>, kaj kunlaboru;

☆ ankaŭ estus interese krei tiajn reago-listojn enlande (ekzemple en Pollando por polaj gazetoj). Mi scias, ke kelkaj landoj funkciigas tiajn reag-servojn, sed ne multaj.

Renato Corsetti

LINGVAJ HOMAĜAJ RAJTOJ

“Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ alia...”, tion diris Zamenhof en la konata parolado en la londona Guildhall en la jaro 1907-a. Preskaŭ unu jarcento pasis de tiam, jarcento plena je la plej teruraj teruraĵoj, kiujn certe Zamenhof ne povis imagi, jarcento plena je teruraĵoj plenumitaj ne de popoloj postrestintaj kaj vivantaj en profundaj ĝangaloj sed de la landoj laŭ komuna sento plej civilizitaj.

Ankoraŭ hodiaŭ se vi legus la verson “Popolo popolon atakas kruele”, vi povus kredi, ke ĝi estis ĵus verkita por priskribi okazaĵon de ĉi tiuj tagoj. Sed eĉ io pli malbela okazas, laŭ mia kompreno, ĉar malgraŭ la paso de unu jarcento la proponantoj de perforta solvo de ĉio solvinda, la proponantoj de la “leĝo de la ĝangalo”, nun kiel tiam ne hontas pri si mem sed eĉ male ili fieras pri si mem.

Mi jam aŭdas iujn, kiuj demandas kaj admonas: “Kiel tio rilatas al Esperanto? Ĉe ni oni parolu pri kulturo kaj ne pri politiko!”. Tamen, karaj geamikoj, ni perfidus Zamenhofon kaj liajn ideojn pri egaleco inter la popoloj, finfine la nebulan sed tre fortan internan ideon de Esperanto, se ni ne agas ankaŭ en ĉi tiu epoko surbaze de tiuj ideoj.

Tio estas esence la kialo, pro kiu UEA decidis nun lanĉi la kampanjon "Lingvaj Homaj Rajtoj". Ĝi volas esti ampleksa informkapanjo, kiu ree proponu la uzon de la internacia lingvo Esperanto kiel ilo de justeco, eventuale ankaŭ sed ne nur kiel ilo de efikeco.

Justeco en la rilatoj inter la malsamaj gentoj estis la ĉefa celo de Zamenhof (vidu lian paroladon, el kiu ni citis kelkajn vortojn en la komenco). Justeco en la rilatoj inter malsamlingvaj gentoj povas esti atingita. Laŭ ni, nur per la uzo de neŭtrala lingvo kiel Esperanto.

Al kiu nia kampanjo proponu Esperanton? Mia respondo estas: "Al ĉiuj!" Mi opinias, ke la malobservo de lingvaj homaj rajtoj okazas praktike ĉie en la mondo, kaj ke ĉiuj homoj, kies rajtoj estas malobservataj, estas same fermitaj aŭ same malfermitaj je niaj temoj. Certe en kelkaj situacioj la problemo estas pli brula, sed simple laŭ mi estas erare veti sian tutan monon sur unu numero. Simple estas erare aserti, ke "nur Eŭropo triumfigos Esperanton" aŭ ke "nur lingvistoj donos al ni la venkon" aŭ ke "nur per laboro ĉe la brazilaj amasoj, ktp." aŭ ke "nur per la praktika uzado en turismo ktp."

Praktike, kiam temas pri agado favore al Esperanto, neniu el ni havas la monopolon pri la vero. Ĉiuj ideoj estas respektindaj, ĉar en ĉiu el ili estas parta vero. Simple ni devas kombini la tradiciajn "desuprismon" kaj "desubismon", kaj toleri, ke aliaj havas ideojn tute malsimilajn je niaj. Ankaŭ ili parte pravas avantaĝe al Esperanto.

Vi scias, ke kelkaj neesperantistoj, kiel Tove Skutnabb-Kangas kaj Robert Phillipson, kaj aliaj ĉirkaŭ ili provas lanĉi la koncepton pri Lingvaj Homaj Rajtoj. Esence ili diras, ke oni respektu la lingvon de ĉiuj malplimulto, malnovaj kaj novaj, ekzemple en lernejoj, kiuj ne iĝu loko por kultura genocido. Oni respektu je internacia nivelo ĉiujn popolojn kaj ĉiujn lingvojn kaj evitu lingvan imperiismon, pri kies efikoj Robert provas atentigi per libroj kaj artikoloj.

Sed la Deklaracio pri Homaj Rajtoj mem en sia dua artikolo jam tute klare parolas pri la neceso eviti diskriminaciojn bazitajn sur lingvo. Tiun parton de la Deklaracio oni ne aplikis dum la pasintaj 50 jaroj. Verŝajne nun estas la momento insisti pri ĝi. Niaj pioniroj, cetere (kaj ne devigu min retrovi la citaĵon de Zamenhof pri la lingvo kiel homa rajto (tiel!), inventis tiujn konceptojn longe antaŭ ol oni komencis entute paroli pri la Deklaracio. Cetere en la statuto de UEA tiu strebo kristaliĝis en la dua punkto de la artikolo pri celoj: (b) "agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon".

Ni provu, do, ligi Esperanton al tiuj konceptoj en la menso de la homoj. Esence la celo estas, ke post iom da tempo, kiam oni aŭdos la vorton Esperanton, oni aŭtomate pensos:

"Aĥ, jen ree tiuj, kiuj okupiĝas pri lingvaj homaj rajtoj!"

Vi scias, ke oni jam komencis labori en tiu direkto. La Komunikad-Centro en Bruselo, malgraŭ sia terura nomo, provas fari ĝuste tion. UEA ĵus eldonis Esperanto-dokumenton pri "Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj". Se vi volos traduki ĝin al via lingvo kaj disvastigi ĝin al viaj samlandanoj, tio povus esti via unua ago por ĉi tiu kampanjo. Kontaktu UEA-n tiucele.

Ĉiukaze la kampanjo "Lingvaj Homaj Rajtoj" konsistu el pluraj kunordigitaj agadoj (kaj la listo estas nur komenca listo):

(a) - provo atingi, ke Unuiĝintaj Nacioj (UN) diskutu la rezolucion aprobitan de Ne-Registaraj Organizaĵoj en rilatoj kun UN, alprenitan okaze de kunveno en Seŭlo. Tiu rezolucio petas, ke la Socia kaj Ekonomia Konsilantaro de UN serioze pristudu la problemon de internacia help-lingvo.

(b) - la agado "lingvo de paco kaj dialogo" kadre de la Jardeko por kulturo de paco 2001-2010 de Unesko kaj UN, kies oficiala partnero UEA estas. Ĝi esence baziĝus simple sur ofertado de retaj Esperanto-kursoj al NRO-oj kaj al individuoj, ĉefe en militaj teritorioj, sub la ŝildo de tiu Unesko-kampanjo, kaj sur aliaj iniciatoj kiuj provos ekestigi dialogon inter malsamaj civilizoj.


(c) - "lingvaj homaj rajtoj" estas la koro de la inform-kampanjo al intelektuloj, ĵurnalistoj, politikistoj, normala publiko. Ĝi devus konsisti el informpakaĵo, kunmetita de ni kaj vaste donacata tra la mondo, kaj el anoncoj en gazetoj. La celo de la anoncoj, kompreneble, estus la lingvaj homaj rajtoj, sed per la fina adreso oni kunligus ilin al Esperanto kaj al Esperanto.

Kiel mi havis jam okazon diri aliloke, persone mi estas nur profeto sen armiloj kaj UEA povas fari nur tion, kion vi faros en ĝia nomo. Por efektiviĝi ĉi tiun programon ni bezonas vin ĉiujn, individuajn membrojn, asociajn membrojn kaj nemembrojn. Ni bezonas tiujn, kiuj havas informistajn kapablojn por redakti la anoncojn, ni bezonas tiujn, kiu havas komputilajn kapablojn, por verki la anoncajn TTT-paĝojn, ni bezonas tiujn kun organiza kapablo kaj kun financa kapablo, ni bezonas ĉiujn landajn asociojn kaj ĉiujn lokajn klubojn. Unuvorte ni bezonas ĉiujn esperantistojn de bona volo por klopodi ŝanĝi la bildon de Esperanto ĉe la tuta publiko. Kontaktu min aŭ miajn estrarajn kolegojn aŭ la oficistojn de UEA kaj ofertu vian helpon. Nia adreso por papera poŝto estas UEA, Nieuwe Binnenweg, 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando kaj nia ret-adreso estas <uea@co.uea.org>.


— Renato Corsetti




aŭto




kamioneto kun remorko




malgranda kamiono




buseto



kamiono




buso





traktor-kamiono kun remorko


VESTOJ POR KANADA VINTRO



Anorako (palto kun kapuĉo)



Kol-tuko



Internaciaj novaĵoj

AŬTOMATA TRADUKO AL ESPERANTO

Ekde decembro 2001 funkcias tradukilo 'Elitrad' ĉe <http://traduku.net>. Elitrad remontras anglalingvajn retpaĝojn en Esperanto kun la originalaj aspektoj.

La servo anstataŭigas anglalingvajn vortojn kaj frazojn per samsignifaj vortoj kaj frazoj esperantlingvaj. Sekve, la rezulto ne estas vera traduko en norma Esperanto sed nur la angla en aliaj vortoj, kiun ni nomas "antaŭtraduko". Mankas akuzativoj, pluralaj adjektivoj, kaj la verboj plejparte montriĝas kiel radikoj (vid - dir - ven) sen la kutimaj finaĵoj. Esperanto, sed ne kiel ni amas ĝin.

Kaj tamen, la "antaŭtradukoj" estas sufiĉe kompreneblaj kaj jam utilas al la esperantistaro. Dum ni atendas perfektan tradukilon, ni proponas ĉi tiun provizoran servon, promesante ke ni daŭre plibonigos ĝin. Ni sciigos gravajn ŝanĝojn - novajn terminarojn, ĝustigojn ktp - en 'soc.culture.esperanto' kaj la dissendolisto

http://groups.yahoo.com/group/traduku_net.

Kiel la jamaj tradukiloj en aliaj lingvoj, oni povas kaj tajpi/almeti anglalingvajn vorton, frazon aŭ alineojn al Elitrad por tuja traduko, kaj almeti la retadreso (URL) de iu anglalingva retpaĝo al Elitrad por vidi kompletan kopion de la paĝo en (antaŭtraduka) Esperanto.

Elitrad montras siajn antaŭtradukojn laŭ diversaj manieroj ("opcioj"), ekzemple ...

- ★ Unu traduko por ĉiu vorto aŭ frazo
- ★ Same, sed kun supersignaj numeroj. Metante la kursoron sur numeron, oni legas malsupre de la ekrano alternativajn tradukojn de la koncerna vorto aŭ frazo.
- ★ Plena traduko. Tuj montras ĉiujn alternativajn tradukojn de ĉiuj vortoj aŭ frazoj. Utilas se oni volas redakti la tekston en norman Esperanton.

'Elitrad' estas kunlabora projekto realigata tute per Interreto, fare de... Aaron Irvine (programado), Carrickfergus, Norda Irlando, Mike Leon (vortprovizo), Lower Hutt, Nov-Zelando

(ret-info)

ESPERANTA TELEVIDO

La Sekretario de ERA ('Esperanto' Radikala Asocio) Giorgio Pagano prezentis pasintjare, al kelkaj partoprenantoj de IJF 2001 en Bolsena (Italio), iniciaton pri la eblecoj elstarigi "E-TV", t.e. informan programon en televida formo, dissendota per TTT de interreto.

Nun, ankoraŭ en tiu kadro, ERA dissendas alvokon al ĉiuj esperantistoj kiuj intencas kunlabori, precipe tiuj kiuj havas iom da kompetenteco (ankaŭ nur hobian) pri televido, kameraoj, informado aŭ simile. Do, ankaŭ al reĝisoroj, aktoroj, redaktoroj, aŭ, ĉiukaze, al interesitoj. Tiuj personoj povas sendi mesaĝon al

<esperantoradikalaasocio@esperantio.org>.

Kelkajn informojn vi povas akiri en TTT-ejo: <http://www.esperanto.tv>, kie vi povas aŭdi ankaŭ (bedaŭrinde nur en la itala lingvo) parton de la debato je tiu renkonto en Bolsena.

(ret-info)

ESPERANTA ĈOKOLADO?

Eble interesos vin provo antaŭenigi la Aferon en ne tro kutima maniero.

Antaŭnelonge mi skribis al la oficejo de la famega svisa ĉokolado-fabriko "Toblerone". Sur la pakaĵo de la ĉokoladoj aperas la ingredientoj en multegaj lingvoj; do mi sugestis ke estu versio ankaŭ en Esperanto. Se ili akceptus, tio estus vasta reklamilo pri Esperanto, sed al ili mi skribis, prave, ke skribado en E-o sur la pakaĵo de la ĉokolado atingus milionon da dankemaj e-istoj tra la mondo (plimultiĝo de vendoj) kaj krome helpus la internaciecan imagon pri la ĉokolado "Toblerone".

Mi ricevis la suban respondon, kaj mi instigas vin, post la legado, reagi al Elisabeth Misteli, kaj ripeti la peton, ke oni skribu la liston de ingredientoj sur la ĉokolado "Toblerone" ankaŭ en Esperanto. Espereble ricevinte multajn mesaĝojn el plej diversaj landoj, ili ŝanĝos sian opinion...

Jen la respondo kiun mi ricevis [kun grandega ĉokolado kaj reklamo pri Toblerone en Ido... de la jaro 1920]:

"Kara sinjoro, Multan dankon pro via letero proponante al ni aldoni E-on al la pakaĵo de Toblerone. Efektive, tio estas bonega ideo... kiun nia fabriko jam havis antaŭ longega tempo, kiel vi vidas sur la aldonata kopio de reklamo kiu datigas de 1920! Pro diversaj kialoj tiu lingvo estis forlasita. Multan dankon denove pro via interesiĝo."

Jen la adreso por viaj leteroj:

Elisabeth Misteli
Communication Manager
Kraft Foods Schweiz AG, Confectionery Plant
Riedbachstrasse 150-151, CH-3027 Bern-Bruennen, Svisio
retadreso: EMisteli@krafteurope.com

Doron Modan

SUBVENCIOJ POR LINGVISTOJ

La "Esperantic Studies Foundation" <<http://www.esperantic.org>> proponas subvenciojn por Esperantistoj kiuj deziras sekvi tri-jaran kurson pri interlingvistiko ĉe la universitato Poznan en Pollando. La subvencioj pagos la nur la instrukostojn; oni proponas maksimume tri ĉiujare. La kurso pritraktas la lingvon Esperanton detale - pri ĝia strukturo, gramatiko, kaj ankaŭ pri ĝia historio kaj la Esperanoto-movado. La plimulton de la kurso oni faras malĉeeste, sed ĉiutrimestre okazas unusemajna ĉeesta kurso en Poznan. Se do vi jam havas iom da sperto pri lingvistiko kaj bone regas Esperanton, kaj interesiĝas pri tia kurso, indas kandidatiĝi por la subvencioj. Aliĝilojn al la kurso oni sendu al D-ro Ilona Koutny <ikoutny@amu.edu.pl> antaŭ la 15a de aŭgusto kaj petojn por subvencioj oni sendu al Mark Fettes <mfettes@esperantic.org> antaŭ la 31a de julio. Priskribon de la kurso vi trovos ĉe

<<http://esperantic.org/ced/fakoj.htm>>.

LANĈO DE EDUKADO-NET

La 14-an de decembro 2001 lanĉiĝis la retejo "edukado.net"! Mi nun persone invitas vin al la vizito de la paĝaro, aŭ pro tio, ja vi ĉeestis la planadon, aŭ ĉar iusence vi kontribuis al la kreado sendante librojn, sugestojn kaj konsilojn..

Bonvolu rigardi nian laboron kaj lasi mesaĝon en la gastlibro de la paĝaro, helpante nin per viaj konsiloj kaj opinioj. Se la paĝo montriĝas utila kaj populara servo, estas granda ŝanco ke ESF financos ĝian pluan konstruon. Se ankaŭ vi volas tion, esprimu vian konsenton. (Ili decidis pri la subvencio en la unuaj tagoj de januaro.)

Kaj nun ni tondus la rubanon, bonvenon en la retejo de Esperanto-instruistoj kaj lernantoj: <http://www.edukado.net>

Salutas vin el al nomo de la teamo:

Katalin Kovats (eks: Smideliusz)
katalin.kovats@wanadoo.nl
(ret-info)

VENONTAJ UNIVERALAJ KONGRESOJ

La Estraro de UEA, kunveninta en Roterdamo 11-13 de januaro 2002, interalie decidis principe pri la estontaj Universalaj Kongresoj.

Por 2004 la Estraro akceptis la inviton de Ĉina Esperanto-Ligo okazigi Universalan Kongreson en Pekino. Oni antaŭvidas subtenon de la ĉina registaro kaj entuziasman kunlaboron de la ĉinaj movadanoj.

Por 2005 estis akceptita la invito de Litova E-Asocio. Tiam la 90-a Universala Kongreso de Esperanto gastos en la ĉefurbo de Litovio, Vilniuso. Ĉar en 2005 estos la centjara jubileo de la 1-a UK (tamen ne temos pri la 100-a UK, ĉar en kelkaj jaroj la kongresoj ne okazis pro la mondmilitoj) oni antaŭvidas specialan antaŭkongresan programon en Bulonjo-sur-mar, Francio. Bulonjo mem estas tro malgranda por gastigi modernan UK.

Siaflanke Litovio, proksime ligita kun la historio de Esperanto, kun elstare amasa E-movado, prezentas tre favorajn kondiĉojn kaj ŝtatan subtenon.

KOMUNIKADA CENTRO EN BRUSELO

En Bruselo kreiĝis Komunikada Centro, kiun starigas Eŭropa Esperanto-Unio (www.lingvo.org) kunlabore kun kelkaj eŭropaj E-asocioj. Ĝi situas proksime al eŭropaj instancoj, fondaĵoj, miloj da diverslandaj ĵurnalistoj kaj internaciaj neregistaraj organizoj.

La celo de la Centro estas profesinivele informi la eŭropajn kaj ankaŭ tutmondajn amaskomunikilojn pri la lingvaj problemoj, faktoj de lingva diskriminacio, proponante sekve de tio informojn pri la ekzistanta solvo prezentata de Esperanto.

La motoro de la ideo kaj la ĉefa laborforto en la komenca stadio estas brusela ĵurnalisto David Ferguson (Dafydd ap Fergus), kimrodevena irlandano, bone orientiĝanta en la brusela Babelo.

Dum la ĵus okazinta kunsido de la Estraro de UEA estis akceptita decido provizi la Centron per garantia sumo de 19 mil euroj, tiel ebligante ĝian ekfunkcion. Tio estas granda parto de la antaŭvidata ĉi-jara buĝeto; la ceterajn rimedojn devos kontribui Eŭropa E-Unio, Flandra E-Ligo, Esperanto Nederland kaj aliaj kunlaborantaj asocioj.

LA UNUA ESPERANTO-SIMFONIO NUN HAVEBLA KOMPAKTDISKE!

[Ashburn, Virginio, Usono, la 19an de januaro 2002]

La muzikfirmao "Verda Stelo Music" fieras anonci, ke la longe atendita orkestra kompaktdisko kun la unua Esperanto-simfonio (de la usona komponisto David Gaines)

jam haveblas por aĉeti. La usona firmao "MMC Recordings" eldonis la KD-n, kiu enhavas ankaŭ la koncerton por eŭfoniumo (tenora tubjo) kaj orkestro de D-ro Gaines. Oni povas trarigardi kaj aĉeti la diskon ĉe la TTT-ejo de "MMC Recordings" ĉe <http://www.mmcmusic.com>. Eventuale la KD haveblos ankaŭ ĉe la kutimaj grandaj vendejoj por klasika muziko tutmonde, kaj ankaŭ ĉe E-movadaj libroservoj. La KD kostas po USD\$ 14.95.

Netigita kiel doktoriĝa disertacio en 1998, la Simfonio N-ro 1 ("Esperanto") por mezsopranulino kaj orkestro de D-ro David Gaines registriĝis de la Moravia Filharmonika Orkestro de Ĉeĥio sub la gvido de dirigento V. Micka, kun kantistino Kimball Wheeler, en oktobro 2000. Jen la unua simfonia muzikaĵo por orkestro iam ajn komponita uzanta tekston en la internacia lingvo Esperanto!

La usona komponisto David Gaines estas rekonita internacia kaj pro lia muziko kaj pro lia entuziasma reklamado de la muziko de aliaj usonaj gekomponistoj per la internacia lingvo Esperanto. Li estis gastkomponisto ĉe la Universitato de York en Britio, la Rejkjavika Konservatorio en Islando, kaj la Internacia Muzik-Seminario en Stara Zagora, Bulgario. D-ro Gaines posedas diplomojn de la usonaj universitatoj Northwestern University, American University, kaj la Peabody-Konservatorio de Muziko de Johns Hopkins University. Inter liaj honoroj estas la Unua Premio en la kanto-branĉo de la 1995-aj Belartaj Konkursoj, pro lia korusa kanto "Povas Plori Mi Ne Plu."

Por pli da informo pri la simfonio aŭ pri alia muziko de David Gaines, turnu vin al <http://www.davidgaines.org> au <http://www.mmcmusic.com>, aŭ skribu al info@davidgaines.org (Esperante) aŭ info@mmcrecordings.com (anglalingve).

LA NOVA PLENA ILUSTRITA VORTARO


DE ESPERANTO HAVEBLA (formato: 150x255 mm, 1265 paĝoj)

PIV, referenca vortaro de Esperanto en la tuta mondo, kies unua eldono aperis en 1971, estas finfine presita kaj liverita. Temas pri funde reviziita kaj aktualigita eldono, kies ilustraĵoj estas lokigitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed enkorpiigitaj en la teksto mem. La inaŭguro de la verko okazos kun ĉeesto de ĝia ĉefredaktoro, Michel Duc-Goninaz, dum la SAT-kongreso kiu havos lokon de la 1-a ĝis la 7-a de julio en Alikanto (Hispanio).

Prezo: 70 eŭroj + registrita afranko.

Pro la kongreso kaj libertempoj, la plenumo de la mendoj kaj antaŭmendoj povos okazi nur post la libertempoj. Pliaj informoj estas riceveblaj de: SAT, 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio. [<satesper@noos.fr>](mailto:satesper@noos.fr), <http://www.sat-esperanto.org/>

Henri Masson



TRANSEN

- 1 prezenti(r) ideon
- 5 loko apud nepalo
- 11 malestima interjekcio
- 12 libro, rakonto, ktp. (r)
- 15 maljuna(r)
- 16 malfaciligu
- 17 Vere!
- 18 koncepto(r)
- 19 post dimanĉo(r)
- 20 brita trinkaĵo(r)
- 22 peceto(r)
- 23 mankvanto
- 25 honoran respekton
- 29 dudeka litero
- 31 marŝu, veturu, ...
- 32 deksesono de funto(r)
- 33 radiko de suben-6
- 34 belnacian

35 sekvanto(r) de la papo

- 38 sur (angligita) / frakcio
- 39 multfoje
- 41 regule aranĝinta
- 45 resenda pronomo
- 46 instige parolu
- 47 artikolo
- 48 vira pronomo
- 50 piedvesto(r)
- 51 brito(r)
- 54 peraĵo
- 55 malvira(r)
- 57 seninteresiĝu
- 58 nepersona pronomo
- 60 turnigonta ĉirkaŭ akso
- 63 radiko de 59-suben
- 64 bone uzeblan
- 65 rapidigu ĉevalon

SUBEN


- 1 bazo(r) de rezonado aŭ konduto
- 2 fojfoje(r)
- 3 radiko de suben-29
- 4 sesflankan kristalon
- 5 de inklinado
- 6 moviĝu
- 7 dubanta interjekcio
- 8 kaj (francigita) / malenorma [r]
- 9 senprokraste
- 10 publike paroladan
- 13 ŝanĝu staton
- 14 ne ellasu(r)
- 15 senĉese
- 21 alprenos filon
- 24 metaforiga sufikso
- 26 malnova pafilo(r)
- 27 senti(r) plezuron
- 28 ian viran parencon
- 29 vivanta religie

30 kiel kutimo(r)

- 35 mallaksu
- 36 iu
- 37 person
- 40 inklinsenca sufikso
- 42 turnmoviĝis
- 43 radiko de 54-transen
- 44 ne drinku
- 49 multpersona pronomo
- 52 antaŭbaldaŭ
- 53 akvero(r)
- 56 najlo(r) por metalo
- 57 malega
- 59 strofaro
- 61 duapersona pronomo
- 62 komparanta konjunkcio
- 63 monmetalo(r)

Dankon al Don Reble!

SOLVO AL LA VINTRA KRUCVORTENIGMO



— Refoje, dankon al Don Reble

djr@nk.ca

LA AVENTUROJ DE SUPERZAM MODERNA HEROO N-RO 3

SURTERE, SUPERZAM ALVOKAS SIAJN FIDELAJN AMIKOJN, RETO KAJ RIKO ...



RAPIDU, RETO - SUPERZAM BEZONAS NIAN HELPON!

JES JA, RIKO - NI TUV IRU AL LI KUN LA SPECIALA HELPILO!

LA DEMONO KRANIULO DUME FORFLUGIS ĜIS LA CENTRO DE LA URBO NENOPOLO, KIE LI KOMENCAS CELUMI LA ĈEFajn MONUMENTOJN



SEP, SUBITE ... IO OKAZAS AL LA MALANTAŬA PARTO DE LIA FLUGMAŜINO !?

LI EKALAS SURTEREN, ĈE LA PIEDOJ DE RETO KAJ RIKO ...



EN LA LASTA NUMERO, VI LEGIS KE MISTERA DEMONO, NOMITA KRANIULO, FALIĜIS NIAN HEROON PER STRANGA FLAVA RADIO ...



HA - HA - HA!

LA DU ĴURNALISTOJ TUV RAPIDAS AL SIA AMIKO ...

RAPIDU! LI FORFLUGAS EN TIU DIREKTO!

N.B. TIU SAKO ENHAVAS LA SP. ĈIALAN HELPILON



FINFINE, KRANIULO! NI KAPTIS VIN



JES JA - PER LAŬTA LEGADO DE TIU PRINCIPARO DE LA FROSTA VALO!

DANKON, MIAJ AMIKOJ - VI SAVIS AL MI LA VIVON!

Ho - ESTIS NENIO! JES - NENIO! SED ĈU VI POVAS KLARIĜI AL NI, KIU ESTAS TIU MISTERA DEMONO?

AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

ANTAU LONGA TEMPO, MIAJ ĜEPATROJ LOĜIS SUR LA PLANEDO BELSTOK (N-ro 1887) ...

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!

KAJ NIA MODERNA HEROO KOMENCAS KLARIĜI AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!

KIA ESTAS LA MISTERA RADIO? KIEL NIA HEROO ESKA PIS DE PLANEDO 1887? NEPRE LEGU LA SEKVON EN "KIAL NE?"

JES - NENIO! SED ĈU VI POVAS KLARIĜI AL NI, KIU ESTAS TIU MISTERA DEMONO?

AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!

JES - NENIO! SED ĈU VI POVAS KLARIĜI AL NI, KIU ESTAS TIU MISTERA DEMONO?

AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!

JES - NENIO! SED ĈU VI POVAS KLARIĜI AL NI, KIU ESTAS TIU MISTERA DEMONO?

AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!

JES - NENIO! SED ĈU VI POVAS KLARIĜI AL NI, KIU ESTAS TIU MISTERA DEMONO?

AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!

JES - NENIO! SED ĈU VI POVAS KLARIĜI AL NI, KIU ESTAS TIU MISTERA DEMONO?

AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!

JES - NENIO! SED ĈU VI POVAS KLARIĜI AL NI, KIU ESTAS TIU MISTERA DEMONO?

AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!

JES - NENIO! SED ĈU VI POVAS KLARIĜI AL NI, KIU ESTAS TIU MISTERA DEMONO?

AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!

JES - NENIO! SED ĈU VI POVAS KLARIĜI AL NI, KIU ESTAS TIU MISTERA DEMONO?

AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!

JES - NENIO! SED ĈU VI POVAS KLARIĜI AL NI, KIU ESTAS TIU MISTERA DEMONO?

AL SIAJ FIDELAJ AMIKOJ SIAN TUTAN LONGAN HISTORION

MI ESTIS JUNA GENIO, MIA PLEJ BONA AMIKO, KIU NOMIĜIS BELFRUNT, DIRIS KE ANKAŬ LI INVENTIS ION ...

TAMEN, UNU TAGON, LIA MIRAKLA INVENTAĴO SUBITE EKSPLODIS ...

TEMIS PRI ĜIA STABILA ... ĈUOKAZE, LA EKSPLODO TUTE SANGIS MIAN AMIKON, KIU FARIĜIS ...

KAJ LI SAJNE TUTE KULPIĜIS MIN PRO SIA AKCIDENTO. LI INVENTIS MISTERAN FLAVAN RADION ...

... KIU KAŬZIS KE MI SENTIS MIN TUTE SENFORTA KAJ FEBLA. ESTIS TRE MISTERE !!!